

## Francilia federacio Komitatkunsido 28/01/2022

### Partopreno

- Michèle Abada-Simon (MAS) ĉeestas
- Pierre Gauthier, vic-kasisto (PG) ĉeestas
- Marc Giraud, prezidanto (MG) ĉeestas
- Didier Janot (DJ) rete ĉeestas
- Aurélien Lestage (AL) ĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) rete ĉeestas
- Didier Loison, kasisto (DL) rete ĉeestas
- Marielle Martin (MM) rete ĉeestas
- Laure Patas d'Illiers, sekretario (LPI) rete ĉeestas
- Guillaume Vera-Navas (GVN) sin ekskuzis kaj transdonis rajton al MG
- Frantz Vichot (FV) rete ĉeestas

### Ekde la antaŭa KK

- La protokolo de la KK de la 03/12/21 estis aprobita kaj enretigita al <https://esperanto.paris/komitat-kunsidoj>
- La ZamFesto kaj la reĝkuko estis nuligitaj pro la pandemio.
- Nia asocio renkontis Susanna Beglaryan la 15an de januaro. Pro la sana situacio, nur ĉeestis la estraro. Tiam ni donis al ŝi donacon nome de nia asocio. Por tiuj, kiuj ne povis ĉeesti, eblas alimaniere montri sian dankemon al Susanna. Venu en la sidejo. Tie estas bondezirkarto, kien vi povas enskribi mesaĝon por Susanna. Fine de la monato, ni donos la karton al Susanna. Tiel ŝi konservos niajn bondezirmesaĝojn. Atentu: la nacia asocio *Espéranto France* organizas siajn proprajn donacon kaj eventon, priskribitajn en ĝiaj mesaĝoj.

### Novjaraj bondeziroj

MG sendis aŭ sendos mesaĝon de novjaraj bondeziroj al la lokaj asocioj, IFEF, SAT Amikaro, Eo klubo de Romo, [yohann.roszewitch@paris.fr](mailto:yohann.roszewitch@paris.fr) (adjoint au maire de Paris Centre en charge de la vie associative).

### Mesaĝo al membroj kaj interesatoj

MG sendis mesaĝon al la jenaj diskutlistoj:

- [amikaro-francilio@googlegroups.com](mailto:amikaro-francilio@googlegroups.com) (interesatoj pri franciliaj eventoj)
- [membraro-francilio@googlegroups.com](mailto:membraro-francilio@googlegroups.com) (lastajaraj kotizintoj)

Per la mesaĝo ni sendis novjarajn bondezirojn, informis pri la dato de la ĜA, instigis al realiĝo por 2022 kaj al kandidatiĝo al la komitato. Tiu mesaĝo estis sendita retpoŝte al homoj kun retpoŝtadreso kaj poŝte al la 8 membroj sen retpoŝtadreso.

## Kandidatoj al la komitato

La komitato enhavas de 9 ĝis 15 komitatanojn. Ĉiuj estas elektitaj de unu ĜA ĝis la sekvanta ĜA, t.e. por proksimume unu jaro.

Ĉu la nunaj komitatoj decidus kandidatiĝi?

- Michèle Abada-Simon (MAS) NE
- Pierre Gauthier (PG) JES
- Marc Giraud (MG) JES
- Didier Janot (DJ) JES
- Aurélien Lestage, (AL) JES
- François Lo Jacomo (FLJ) JES
- Didier Loison (DL) JES
- Marielle Martin (MM) NE
- Laure Patas d'Illiers (LPI) JES
- Guillaume Vera-Navas (GVN) JES
- Frantz Vichot (FV) NE

Aliaj homoj anoncis sian kandidatiĝon:

- Aleks Kadar (AK)
- Marianne Pierquin (MP)

Ĉar jam estas pli ol 9 kandidatoj, ne necesas, ke ni kontaktu aliajn homojn por instigi al kandidatiĝo.

Atentu: kandidatoj, bonvolu sendi al la komitato sinprezenton en kelkaj vortoj (ekz pri aĝo, fako, intereso, projektoj, antaŭaj respondecoj...). Ĉi-sube la sinprezentoj ricevitaj:

- DL : Mi fariĝos jam 49-jara en marto, kaj estas ŝtatoficisto pri buĝeto. Delonga esperantisto, mi iam estis kasisto de JEFO kaj de IJK 2001, vicprezidanto kaj mallonge prezidanto de EF. Mi ofte akceptis gastojn per Pasporta Servo, inter kiuj prelegintojn en la sidejo.
- AK : En Francio mi estas membro kaj aktivulo de la regiona asocio Esperanto-Francilio, de la Landa Asocio Espéranto-France, de la movado Eŭropo Demokratio Esperanto. Mi plurajn jarojn organizis la Esperanto-budon en la Homara Festo (Fête de l'Humanité). Internacie mi estas membro kaj aktivulo de UEA, kies Ĝenerala Sekretario mi estas ekde 2018 ĝis 2022.
- LPI: Mi esperantistiĝis en 2012. Mi estas delonge komitatano de la francilia federacio, kaj mi estas ĝia sekretario ekde la ĜA 2020. Mi interesiĝas pri kulturaj eventoj.
- GVN : mi esperantistiĝis en 2018/ Mi volas daŭrigi stiri la projektojn jam komencatajn, ĉefe finpretigi la ekspozicion pri Lucien Peraire.
- DJ : Mi esperantistiĝis en 2004 kaj de pluraj jaroj aktivas por Esperanto. Interalie mi zorgas pri nia retpaĝaro <https://esperanto.paris> kaj pretas daŭrigi.
- MG : Muzikinstruisto, mi eklernis Esperanton en 2018. Mi prezidas la francilian federacion de 2 jaroj kaj aparte aktivas kadre de ĝemelaj urboj Romo kaj Parizo.
- FLJ: Esperantisto ekde 1971, emerita matematik-instruisto (kaj lingvisto), mi aktivas en diversaj kampoj de la Esperanto-movado, nuntempe Greziljono, Akademio, UEA - Unesko, EDE... kaj la Francilia federacio, kie mi gvidas kurson kaj partoprenas kelkajn filmadetojn.
- PG : Mi lernis esperanton en 1998 per kurso gvidata de DL en Diĵono. Post longa periodo kiel simpla

membro de Espéranto-France, mi aliĝis al Esperanto-Francilio por prepari la KER-ekzamenojn en 2017-2018. Komitatano ekde 2019, mi aparte deziras konigi la kulturen heredaĵon de la Esperanto-movado.

- MP : Bibliotekisto, mi eklernis Esperanton antaŭ 9 jaroj interalie dank'al nia Federacio. Nun, Esperanto fariĝis mia ĉiutaga lingvo. Pasintece mi jam aktivis kiel komitatano kaj prezidanto. Post paŭzeto pro personaj kialoj, mi denove pretas dediĉi tempon kaj kunlabori por nia asocio kaj ĝiaj membroj.

Atentu: la listo kaj la sinprezentoj nepre estu definitivaj **la 7an de februaro**.

## Decidoj de la komitato

La komitato en posta KK decidis pri la prezoj de la kursoj (pro tre malsamaj prezoj inter reta kaj surloka) kaj limo de valoro en senpagaj libroj. DJ proponas ke la kursgvidanto mem decidu pri la prezo de sia kurso. DL proponas ke tiam la komitato decidu ĉu ni proponos rabaton (ekz 20%) de la prezo tra Pass Culture 12 aŭ Navigo.

La komitato nun decidis doni 1.000€ al edukado.net (pro uzado de ĝia enhavo dum kursoj kaj por helpi ĝian renovigon).

La komitato nun decidis doni 50€ al framasoftware (pro uzo de ĝia framapad dum kunsidoj)

## Baloto antaŭ la ĜA

La membroj voĉdonos antaŭ la Ĝenerala Asembleo por aprobi la raportojn agadan kaj finanĉan kaj por elekti la novan komitaton. Ĉu ni proponos plia(j)n voĉdono(j)n? Ne.

## Organizo de la ĜA

La dato de la ĝenerala asembleo (ĜA) 2022 estis fiksita al sabato, la 19a de marto de la 10a matene ĝis la 12a.

Tagordo de la ĜA

- publikigo de la rezultoj de la voĉdonado: aprobo de la 2 raportoj, elekto de nova komitato, aliaj voĉdonoj
- prezento de la agadplano por 2022, peti ideojn kaj helpon por nunaj aŭ novaj projektoj

Loko de la ĜA

Pro la pandemio ĝi okazos mikse, t.e. kaj surloke en la sidejo, kaj rete. Plejmulte da membroj partoprenos rete. FLJ proponas uzi sian Zoom salonon por la reta parto. Kelkaj membroj sen reta aliro povos partopreni surloke, kondiĉe ke ili estu malpli ol la maksimuma nombro permesita (nun 8) kaj sin anoncu al FLJ. FLJ estos surloke en la sidejo de la asocio, partoprenos rete per sia komputilo kaj uzos la televidon kaj la ĵus aĉetitan HDMI draton por ke la ĉeestantoj povu rigardi kaj aŭskulti. Preferindus disponi surtablan komunan mikrofonon por ke la ĉeestantoj facile povu paroli.

## Organizo de la baloto

Ĉiuj membroj voĉdonos nur rete per *balotilo.org*, krom la membroj sen retadreso kiuj voĉdonos poŝte. La reta baloto finiĝos la 18an de marto. La homoj kiuj voĉdonos poŝte devos sendi tiel ke ilia koverto atingu la Ĉerizejon plej malfrue la 17an de marto. Tiel, la rezultoj estos kalkulataj la 18an de marto kaj publikigataj la 19an de marto komence de la ĜA.

## Preparo de la dokumentoj

- Invitilo oficiala kun tagordo kaj praktikaj detaloj (ekz reta ligilo): redaktota de LPI kaj MG
- Agadraporto 2021: preskaŭ finpreparita de MG
- Agadplano 2022: redaktota de MG. Menciitaj ideoj: filmeto, ludotempo, matematika foiro (vidu detaloj ĉi-sube en "Projektoj")
- Financa raporto 2021: preparota de DL kaj PG morgaŭ en la sidejo
- Balotilo kun listo de kandidatoj kaj sinprezentoj: preparota de LPI kiam ĉio estos definitiva, post la 7a de februaro

Atentu: ĉiuj dokumentoj estu pretaj **antaŭ la 11a de februaro**. Tiam la komitato validigos ĉiujn dokumentojn antaŭ la sendo.

## Sendo de la dokumentoj

- La 2 raportoj estos disponeblaj en la retejo [esperanto.paris](http://esperanto.paris)
- Al ĉiu membro kun retadreso ni sendos mesaĝon kun oficiala invito, ligilo al la 2 raportoj, informo ke la retejo [balotilo.org](http://balotilo.org) sendos mem individuan ligilon por voĉdoni
- Al la membroj sen retadreso ni sendos poŝte: oficialan invitilon, la 2 raportojn, paperan balotilon kun 2 kovertoj por voĉdoni poŝte
- La sendado okazu plej malfrue la 18an de februaro.
- Al la homoj, kiuj aliĝos inter la 18a de februaro kaj la 17a de marto kaj havas retpoŝtadreson, ni sendos la saman mesaĝon por ke ili povu partopreni la baloton kaj la ĜAn.

## Projektoj

La tuta listo de projektoj legeblas en la protokolo de la KK de la 29/01/21: <https://esperanto.paris/IMG/pdf/2021-01-29.pdf>

- Ludotempo: AL pretus denove okazigi kun MM en aprilo aŭ marto
- Matematika foiro: FLJ pretas prizorgi se estas sufiĉe da homfortoj
- Kontakti la mezlernejojn: GVN, ni atendu
- Kontakti la publikajn bibliotekojn: MP devas klarigi kiel alparoli ilin, ni atendu
- Subglasoj: GVN havas la dosieron, la modelo estas elektita, ni atendu la finon de la sana krizo kaj kundividos la elspezon kun Esperanto 94.
- Ekspozicio pri Péraire: GVN preparas ĝin, okazis prelego, Régis Fournier preparas filmeton
- Paĝmarkiloj: en la ŝranko. Ni disdonos en budoj (kiel la kalendaretoj). Espéranto France povos doni paĝmarkilon en libro aĉetita ĉe la libroservo.
- Donaco de libroj al la venonta multlingva biblioteko Livre Ensemble: MP, ni atendu la decidon krei la bibliotekon

- Ministerio pri financaj aferoj (ties kultura francilia biblioteko "place des arts"): DL, LPI ni atendu ĉu prelego aŭ kurso eblos
- Espéranto Café croissant: plu okazas kun GVN
- Humura filmeto: FLJ, LPI, Régis. Filmade komenciĝis. Necesos rolantoj por la eksteraj scenoj, filmotaj venontan printempon.

### **Estontaj kunsidoj**

- KK por finvalidigi la dokumentojn sendotajn por la ĜA: 11/02/22 7a ptm rete kaj fulmrapide
- ĜA: 19/03/22 10a-12a matene
- KK tuj poste, la novelektita komitato elektu la novan estraron: 19/03/22 12a-13a matene